


EKOLOGIO- ESPERANTO

38, rue Jean Moulin
F 33220 STE FOY LA GRANDE
Tél. 57 45 47 28

Sunradioj



(KOMUNA BULTENO AL AMIK-ARB..AMIN-INF..A.V.E..A.V.U.E..E.K.E.S..)

ENHAVO

- 1) KIAL TIU "KOMUNA" BULTENO?
- 2) KIUJ VERKINTOJ: AMIK-ARB...AM-INFAN...A.V.E...A.V.U.E...E.K.E.S
- 3) ALIAJ ASOCIOJ SUBTENINDAJ(EKOROPA...B.P.I....KUN DEL'LARZAC....)
- 4) AGADOJ, KAMPANJOJ SUBTENINDAJ -KONTRAŬ NUKLEAJ EKSPERIMENTOJ
 -BOJKOTO KONTRAŬ NESTLE
 -KONTRAŬ LA INSEKTMORTIGILOJ
 -LA TAGO DE LA TERO :22a de aprilo
 -"KUNARANGITAJ REARBARIGADOJ"
- 5) DIVERSAJ (ofte POZITIVAJ) EVENTOJ

1) KIAL TIU KOMUNA BULTENO ?

Antaŭ ses monatoj, Christopher FETTES, irlanda fondinto de A.V.E. (Asocio de Verduloj Esperantistoj) proponis al Emilo MAS, franca fondinto de E.K.E.S (EKologio kaj Esperanto), kaj de AMIK-ARB (AMIKoj de la ARBaro) transpreni la publikadon de "AVENO (kvaronjara bulteno de A.V.E.). Jen la mesaĝo sendita la 15 an de decembro, publikota en la venonta bulteno :
 "Estante la fondinto de A.V.E., mi longe bedaŭras la neregulan aperon de nia bulteno. Mi do ĝojas ke entuziasmoplena kaj agema Emilo MAS transprenis tiun taskon. Mi legos la venontajn numerojn kun granda intereso kaj intencas daŭre subteni la asocion." Christopher FETTES.
 Adresoj de la abonintoj de AVENO kaj 2 000 OFF estis senditaj al Emilo MAS. Sed, post la voĉdonado favore al esperanto, la 19an de novembro, en la ĝenerala asembleo de la Francaj Verduloj, alvenis ĉe E.K.E.S. multege da novaj taskoj. Eĉ la fama franca ĵurnalo "LE MONDE" petis dokumentojn, freŝajn novaĵojn ; kaj bonega artikolo pri esperanto ĉe la ekologistoj estis publikigita, en "LE MONDE", la 15an de februaro.

2) KIUJ ESTAS LA VERKINTOJ?

Ni estas pluraj samideanaj ekologistoj, kiuj, jam de longe, agadas en "homemaj" asocioj, kiuj bedaŭras ke ne sufiĉe ofte, la ekologistaj gazetoj pritraktas POZITIVAJN NOVAĴOJN. Finfine, ni decidis kunigi niajn etajn fortojn por aperi "komunan bultenon". Ni longe enketis, cerbumis, k.t.p. por proponi al vi, ĉefe agadojn en kiu la internacia lingvo povas alporti kroman, efikan helpon, do ne refuteblajn argumentojn favore al uzado de ĝi.
 (Ni difinas "HOMEMAJN" asociojn, ĉiajn asociojn, kiuj, NEPERFORTE, agadas por plibonigadi la rilatojn inter ĉiuj estaĵoj (protektado de la NATURO, plibonigo de la HOMRILATOJ, k.t.p)).
 Jen la unuaj "homemaj" asocioj kiuj lanĉas "SUNRADIOJ"n:

AMIK-ARB (AMIKOJ DE LA ARBARO ; franclingve : AMIS DE LA FORET)
 38 rue Jean Moulin 33 220 STE FOY LA GRANDE FRANCIO
 Prezidas : Emilo MAS. (sama adreso)

Sendependa asocio, AMIKARB celas kontribui al kunligado de ĉiaj unuopuloj, asocioj, kiuj jam agadas ĉu por protekti la arbarojn, ĉu por rearbarigi. Dum la lasta pariza salono "ALIMANIERE LABORI KAJ VIVI", de la 6a ĝis la 19a de marto, la deĵorantoj en la budo (bele ornamita) de AMIKARB dialogis pri la arbaraj problemoj kun multaj vizitantoj, el kiuj pli da 1200 suskribis la peticion pri "PROTEKTADO DE LA TROPIKAJ ARBAROJ" lanĉita de EKOROPA (vidu malsupre). Al multaj el ili, ni parolis pri esperanto, kaj 3 vizitantoj aĉetis lernolibron de la internacia lingvo.

Pli ol 200 personoj promesis partopreni en la kampanjo "KUNLIGITAJ ARBARIGADOJ" lanĉata de AMIKARB, kaj jam subtenata, en Francio, de la plej gravaj ekologiaj asocioj kaj gazetoj (AMIS DE LA TERRE, BULLE BLEUE, EKOROPA, JOUR DE LA TERRE, NATURE ET PROGRES, SILENCE, k.t.p.) .

AMINEAN (AMIKOJ DE LA INFANOJ ; franclingve : AMIS DES ENFANTS)
LE FLEIX 24 130 LA FORCE FRANCO . Prezidas : Joël LAPORTE (sama adreso)

AMINFAN agadas-por antaŭeviti la lerneajn malsukcesojn.
-kontraŭ la ekspluatado de la infanoj (en kunlaboro kun aliaj "homemaj" asocioj, kiel "NODAF" (kiun ni prezentos al vi venontbultene.)

A.V.E. (Asocio de Verduloj Esperantistoj) .

Provizora sekretario : Emilo MAS.

Laŭ la jarlibro de U.E.A. (1989a eldono), la celo de A.V.E. estas:

1) la kunligado de esperantistoj kiuj interesiĝas pri la Verda Movado..

2) la uzado kaj plivastigado de Esperanto kiel komunikilo de la Verda Movado.

A.V.E. publikigis plurajn interesajn bultenojn "AVENO". Sed, la fondinto (Mark FETTES) kaj la sekretario (Jean-Claude THUMERELLE) de A.V.E. estis tro okupataj por daŭrigi la publikigadon, kaj petis de Emilo MAS transpreni tiun respondecon.

A.V.U.E. (franca A socio de V erduloj por U zado de E speranto)
Prezidas : Jean-Luc MERMET 71 340 SAINT BONNET DE CRAY FRANCO

A.V.U.E. havas la samajn celojn kiel A.V.E. sed ĝi agadas cefe franclingve. A.V.U.E. bonege kunlaboras kun E.K.E.S. . Tiuj du asocioj, helpataj de provencaj samideanoj multe kontribuis al la elekto, fare de la francaj Verduloj, de esperanto, kiel unu el la oficialaj lingvoj, okaze de internaciaj renkontoj.

A.V.U.E. sendis al BUDAPESTO la 18an kaj 19an de marto, Emilo MAS (kiel akompananto de la francaj delegitoj : la Eŭropaj deputitoj Andrée BUCHMAN kaj Solange FERNEX), por partopreni en la kunveno de la Eŭropaj Verdaj Partioj.

A.V.U.E. sukcesis kreigi, dank'al agadoj de Jean-Luc MERMET, Jocelyne kaj Marc MERY, oficialan komision, pri ESPERANTO, ĉe la Franca Verda Partio

E.K.E.S. (EKOLOGIO KAJ ESPERANTO

38 rue Jean Moulin 33 220 Ste FOY la Grande. Prez.: Emilo MAS (sama adr.)

E.K.E.S. celas : 1) ĉe la esperantistaro : kontribui al pli profunda konsciigo pri la ekologiaj problemoj , kaj ties pozitivaj solvoj.

2) ĉe la ekologistoj (inkluzive ĉe la Verduloj, sed ankaŭ ĉe la ekologistoj ne-verdulaj): kontribui al pli bona kono kaj uzado de la internacia lingvo.

E.K.E.S. , subtenita de F.E.T., SAT-AMIKARO kaj U.F.E., luis budon en la plejparto el la francaj ekologiaj renkontoj, salonoj k.t.p., preleg-debatis pri esperanto en tiaj renkontoj. Nun, E.K.E.S. estas invitata en Belgio, Italio, Svisio, en Orientaj landoj... Sed mankas mono ... kaj homoj ... Kiuj el vi pretas helpi????

E.K.E.S. ekes..tis HOM-TRA-RET (HOMema TRAdukiga RETo), reton da bonvolemaj (aŭ duon-bonvolemaj) altnivelaj tradukistoj por helpi la "homemajn" asociojn .

Jam E.K.E.S. tradukigis :

1) laŭ la peto de la francaj Verduloj , ilian 6paĝan bazan dokumenton :

"LA VIV-ELEKTO", ke ili sendos al aliaj Verdaj Partioj.

2) laŭ la peto de "EKOROPA" , ilian peticion pri la Tropikaj Arbaroj.

Aliaj "homemaj" asocioj ŝatus ricevi helpon de ni per tradukaĵoj ĉu senpage, ĉu malmultekoste. Kiu pretas kunlabori, en la kreskado de tiaj "homemaj" agadoj?

(eĉ komencanto povas kunlabori, ekz. sendante al ni ĉu postmarkojn, ĉu respondkuponojn, ĉu alimaniere... sed, kompreneble ni ĉefe bezonas altnivelajn tradukantojn... eĉ "duon-bonvolemaj"...))

3) ALIAJ ASOCIOJ SUBTENINDAJ

EKOROPA 42 rue Sorbier 75 020 PARIS FRANCO

Internacia ekologia asocio kiu havas korespondantojn en multe da landoj.

Lige kun multe da triamondaj kaj diversaj "homemaj" asocioj, EKOROPA lanĉis peticion, por protekti la tropikajn arbarojn. Jam pli ol 3 milionoj a homoj, en 70 landoj, suskribis tiun peticion. Dank'al tiu sukceso, pluraj defendantoj de tiuj arbaroj estis akceptitaj de PEREZ de CUELLAR, ĝenerala sekretario de U.N.O. (Unuĝintaj Nacioj Organizado). Nun, tiu kampanjo daŭras (ĝis atingo de 30 milionoj da suskribadoj se bezonos!!!), por postuli ke O.U.N. dediĉu eksterordinaran sesion por pritrakti tiun gravegan problemon : LA PROTEKTADON DE LA TROPIKAJ ARBAROJ.

Jam 2 ŝtatoj oficiale subtenas tiun peton : AŬSTRIO kaj KOLOMBIO. Pro tio ke tiu afero estas ege grava, ke multege da homoj subtenis-as-os ĝin, ni insistas por ke ĉiu el la samideanoj helpu ! Kiel??? Petu informojn ... Ankaŭ la transnaciaj trustoj, helpataj de la Monda Banko, kaj de aliaj internaciaj institucioj havas planon por "protekti la tropikajn arbarojn". Sed ilia celo estas nur "profitdona" (industria rearbarigado per ununura speco da arboj, neniel konsultante la tieaj loĝantoj, kiuj tamen havas ofte nur la "saĝan" ekspluatadon de la arbaroj kiel vivrimedon!

EKOROPA proponas "URĜAN PLANON POR LA ARBAROJ KAJ TIES POPOLOJ" adaptita laŭ la bezonoj de ĉiu regiono, sed ankaŭ de ĉiu tiea loĝantaro. E.K.E.S. planas traduki per esperanto, tiujn dokumentojn en la plejmulte kiel eble da lingvoj. Kiu pretas helpi ????? (ne forgesu pripensi ke tiu agado koncernos dekoj da milionoj da homoj, tra la tuta mondo, kiuj escios iel, ke esperanto utilas ankaŭ por konstrui pli bonegan mondon !!!)

P.B.I. (PEACE BRIGADES INTERNATIONAL : INTERNACIAJ BRIGADOJ PORPACAJ) . en Francio : LA HAUTE BRANCHERE 44 850 LE CELLIER

La P.B.I. estas internacia asocio kiu intervenas, NEPERFORTE, en la tria mondo, laŭ petoj de minacataj personoj aŭ grupoj. Ekzemple : en GVATEMALO, dum 5 jaroj, la P.B.I. protektis la G.A.M. (Grupo de Mutuala Apogo), kiu defendas la homrajtojn. (pruntedono de domo por kunvenoj, mediacadoj en konfliktoj kun la aŭtoritatoj, akompanado de minacataj personoj, k.t.p.). Kompreneble ne malofte tiuj brigadanoj estas enkarcerigitaj. Sed, tuj, la internacia reto da subtenantoj intervenas : el dekoj da landoj alvenas centoj da telegramoj ĉe la Prezidento kaj la ŝtata Policestro. Rapide, la brigadanoj estas liberigitaj (kaj ofte, elpelitaj el la lando).

Tuj kiam la "HOM-TRA-RET" (HOMema TRAdukista RETo) estos sufiĉe granda, ni proponas al ili, helpi pere de senpagaj aŭ malmultekostaj tradukaĵoj.

KUN DEL' LARZAC 12 100 MILLAU FRANCO (prononcu : larzak)

Tiu "homema" asocio estas Centro pri serĉado kaj eksperimentado, akcepto kaj formado pri neperforto. Ĝi naskiĝis dum 1 975, okaze de la neperforta rezisto de la kamparanoj del' Larzac, kontraŭ la pliampleksigo de milit-kampo.

Laŭ pluraj restadantoj en tiu komunumo, ŝajnas ke tie, vere, oni provas vivi la "rektan" demokration, la distribuadon de la respondecoj, k.t.p. Ĉiu partoprenanto kontribuas al la elspezoj, laŭ siaj eblecoj. La ĉefaj lingvoj uzataj en la staĝoj estas la franca, germana, sed la nunaj responsuloj estas tre favoraj al esperanto, kaj se ni sufiĉe agadas pri tio, ni povas esperi ke, estontece, ankaŭ la internacia lingvo estos uzata.

A.V.U.E kaj E.K.E.S. organizos, en tiu KUN DEL'LARZAC, staĝon pri esperanto, de la 26a de aŭgusto ĝis la 9a de septembro 1990a kaj se ni sukcesos, venontjare ni povos organizi staĝojn je pli granda skalo, pro tio ke la Eŭropa Komunumo povos finance helpi por la gejunulojn. Ni do nepre devas atingi la nombron de 30 (aŭ pli!!) da staĝiantoj. Kiu pretas partopreni tiun staĝon?? Kompreneble la staĝo estos multgrada, sed ĉefe la "homemaj" ekspresoj estos studitaj.

4) AGADOJ, KAMPANJOJ SUBTENINDAJ

KONTRAŬNUKLEAJ EKSPERIMENTOJ :

De la 5a ĝis la 13a de marto, en pluraj landoj, okazis samtempa fastado, por interpelacii la registarojn, la ekleziojn, k.t.p., por denunci la nukleajn eksperimentojn. Tiu fastado estis subtenata de multaj porpacaj, ekologistaj asocioj, religiaj grupoj (kiel la kvakeroj..).

Tiu agado daŭrigas per sendado de leteroj al ĝenerala sekretario de U.N.O., al Prezidentoj de Francio, de Sovetunio, de Usono, k.t.p., al la estroj de la eklezioj, k.t.p.

Informas : "STOP -ESSAIS", MIR , ROMAND VILLETTE 40 CH 1400 YVERDON (SVISIO)

(Se pluraj samideanoj petas tradukon en esperanton de la konsilindaj leteroj, ni pretas tradukigi ilin. Bonvolu, se eblos, sendi ĉu postmarkojn, ĉu respondkuponojn. Antaŭdankojn.)

BOJKOTO KONTRAŬ NESTLE

Certe vi jam aŭdis, pri la krimoj de iuj transnaciaj fabrikantoj de pulvora lakto, kiuj dum la jaroj 1970, malhoneste, sukcesis konvinki milionojn da tria-mondaj patrinoj forlasi la mamnutradon de siaj beboj, por aĉeti pulvoran lakton. Pro la malpureco de la uzata akvo, pro la nerespekto de la proporcio pri la pulvora lakto (tre multekosta) milionoj da beboj mortis... Granda kampanjo pri tiu skandalo okazis en pluraj landoj, kaj finfine, en 1984, la Monda Organizado pri Sano (M.O.S.) voĉdonigis de tiuj fabrikantoj pri pulvora lakto, "carton" pri honesta propagando.

.Bedaŭrinde, la firmao NESTLE rekomencis sian fi-propagandon kontraŭ la mamnutrado. Do, nova bojkoto estas organizata tra la tuta mondo por devigi tiun fabrikan respekti siajn promesojn.

Informas : SOLAGRAL, 13, Bd ST MARTIN 75 003 PARIS FRANCIO.

KONTRAŬ LA INSEKTOMORTIGILOJ

Almenaŭ 60 landoj malpermesas aŭ severe limigas la uzadon de 12 insektomortigiloj (DDT, DIELDRINO, ENDRINO, k.t.p.) tre nocaj por la homoj kaj bestoj. 90% el la mortoj kaŭzitaj de la insektomortigiloj okazas en la triaj mondaj landoj, kiuj tamen uzas nur kvinonon el la monda produktado.

Informas : FORUM DU DEVELOPPEMENT PO BOX 5850 GRAND CENTRAL STATION NEWYORK NY 10 163-5 850 USONO (tel. 212/963 -1 544.

LA TAGO DE LA TERO :22a de aprilo: (tel.en Parizo :47 34 49 04).
(franclingve :LE JOUR DE LA TERRE :76,rue de Sèvres 75 007 PARIS)
internacie:EARTH DAY 1990 STANFORD UNIVERSITY CALIFORNIA 94 309 USONO
tel.415 321 2040 .

En 1 970,pli ol 20 milionoj da usonanoj partoprenis en la "TAGO DE LA TERO"..... 10 000 lernejoj,2000 liceoj kaj universitatoj ,kaj preskaŭ ĉiuj usonaj komunumoj partoprenis en tiu evento.Poste,dekoj da leĝoj estis voĉdonitaj ,multaj asocioj estigis,kaj milionoj da homoj plikonsciigis pri la graveco de la ekologiaj problemoj.

Ĉijare,en preskaŭ ĉiu lando,ĉiu regiono,ĉiu urbo,k.t.p.okazos ekologiaj manifestacioj .

Ekzemple,en Francio,la Verduloj planis organizi 100 preleg-debatojn. Ankaŭ okazos marŝadoj,plantadoj,purigadoj de arbaroj,de riveroj,k.t.p. Homa ĉeno de 835km laŭlonge de la LUARO,kun arko da 2 000 kajtoj pruvos la determinadon de tiuj kiuj defendas tiun riveregon.

Ni plurfoje telefonis al la francaj organizantoj,en Parizo,de tiuj grandaj eventoj,kiuj akceptis nian proponon kunlabori kun ili. Ni samopinias ke ni devos profiti la oftajn intervenojn de la amaskomunikiloj,pri la multnombraj eventoj tra la tutaj landoj,por ekesti longdaŭrajn instituciojn.Ni do lanĉas novan alvokon ;kiu konsentos:

- 1)Ĉu enketi pri la lokaj eventoj okazintaj,okaze de la "Tago de la tero",kaj sendi al ni raportojn,gazetajn artikolojn,k.t.p.pri ili ?
- 2)Ĉu proponi helpon por daŭrigi la ekologiajn agadojn ,post la 22a de aprilo ? (kompreneble, estas konsilinde aprobi la du proponojn !!!!!..)

5) DIVERSAJ (ofte POZITIVAJ) EVENTOJ

PRI PACO,EN JERUSALEM: de la 28a ĝis la 31a de decembro,venintaj el pluraj landoj,miloj da homoj partoprenis en la neperfortaj manifestacioj por la paco en Palestino.

Laŭ pluraj partoprenantoj,la izraela registaro estis permesinta tiujn manifestaciojn,ne imagante ke ili estos tiel sukcesaj.Do,la vendredon,la policistoj ŝargis la neperfortajn manifestaciantojn,frapante multajn el ili,vundante eĉ italojn, francojn,k.t.p.

Tamen,la lastan tagon,pli ol 30 000 homoj pace manifestaciis laŭlonge e la muregoj de Jerusalemo.Pluraj gravuloj (kiel Yaël DAYAN,filino de la generalo Moshe DAYAN)vizitadas Eŭropon,por konvinki la Diasporon, pri la urĝeco entrepreni porpacan procezon.

PRI DOLĈAJ ENERGIOJ

,en DANLANDO: Pli ol 2 600 ventmotoroj funkcias.Ĉirkaŭ 250 000 homoj estas kun-posedantoj de ili.(tio estas unu dano el 20!!!). Tiu produktado de elektro per ventmotoroj malplikostas ol per tradiciaj rimedoj.

F.G.R.(Federala Germana Respubliko) ,nun,planas,antaŭ 1 995a,imiti Danlandon pri tiu produktado de elektro.

En HISPANIO ,la registaro voĉdonis budgeton da 2 miliardoj da FF por aĉeti ventmotorojn.

En AŬSTRIO,pri SUNENERGIO: 4 200 civitanoj instalas,depost 1 983a, 38 000 m² da malaltprezajn sunergiajn fontilojn

La konsumado pri elektro ĉe tiuj civitanoj malkreskis ĝis 70%.

En GERMANIO ,La komunumo de Bochum decidis transformi la motorojn de siaj 48 rubaĵ-kamionoj.Tiuj motoroj funkcios per gaso produktota per la senutilaĵoj kolektitaj.

(tradukaĵo de tiu prova bulteno, Franclingve, Kontraŭ 2 poŝtmarkoj , haveblas ĉe ni.)

STAĜO DE ESPERANTO POR VERDULOJ En Francio, unua staĝo, organizita de Jean-Luc MERMET (de A.V.U.E.), en sia regiono, estis plensukcesa :

- 1) 12 ekologistoj partoprenis en ĝi.
- 2) Ĉiuj promesis daŭrigi la studadon de esperanto!!!!

RENKONTO DE LA EŬROPAJ VERDULOJ, en BUDAPESTO, la 18a kaj 19a de marto.

45 homoj (delegitoj kaj akompanantoj) el 30 landoj partoprenis en ĝi. Inter ili, estis 5 samideanoj : s-ino Maire MULLARNEY, (IRLANDO) s-no PINERO I COSTA (KATALUNIO), la delegitoj de BULGARIO kaj de POLLANDO, kaj Emilo MAS (FRANCIO), tre afable gastigita ĉe Andraŝ LUKACS, (Prezidanto de la fondaĵo "TALENTO", kiun ni prezentos venontbultene). Komence, ĉiu delegito prezentis la ĉefajn ekologiajn problemojn en sia lando aŭ regiono.

Unuanime, la delegitoj decidis subteni la sendependigon de LITOVIO. Plejparto el la debatoj estis ekdiskutado de projekto pri MEMORANDO, ke la "kunordigarano" de la Eŭropaj Verduloj petas ke ĉiu Verdulo studu, kritiku, k.t.p. La definitiva elektita teksto de tiu memorando estos sendita al ĉiuj delegitoj de la venonta aŭtuna kunveno en Helsinko.

La du oficialaj lingvoj estis la angla kaj la franca, sed la plejparto el la partoprenantoj komprenis almenaŭ iom la anglan. Tamen, inter la debatoj, la samideanoj ofte parolis en esperanto inter si, kaj pri esperanto al aliaj partoprenantoj.

Pro manko da mono (kaj de sperto ĉe la hungaraj Verduloj), la planita aŭtuna kongreso de la Eŭropaj Verduloj estis nuligita.

LA VENONTA KONGRESO DE LA EŬROPAJ VERDULOJ OKAZOS EN SVISIO,
la 25an kaj 26an de majo 1991. (apud ZURICH)

Organizas : PARTI ECOLOGISTE SUISSE Postfach 6415 3001 BERN SVISIO
tel. : (34) 3161 9959 FAX 34) 12 757 042

Ni longe dialogis kun la svisa delegito. Ŝajnas ke estas planitaj 6 oficialaj lingvoj : la angla, franca, germana, hispana, itala kaj rusa. La svisoj ne estas kontraŭ esperanto. Sed jen iliaj respondoj:

- 1) nur 2 aŭ 3 svisaj "Verduloj" estas esperantistoj

Ni do nepre devas insisti ĉe niaj svisaj samideanoj, kiuj simpatias kun la Verduloj, por ke ili aliĝu plej rapide kiel eble al tiu Verda Partio.

Jam, en Italio, s-no MENABENE forlasis la radikalan partion, por aliĝi al la Verda Partio, kaj tiel li povis influ, favore al esperanto, plurajn Verdulojn.

- 2) Ĉiu orientlandano scipovas la rusan lingvon.

Tamen, laŭ la hungaroj, nur kelkaj "privilegiuloj", en tiuj landoj, iris longtempe lerni la rusan lingvon en Sovetunio. La plejparto el la orientlandanoj tute ne plu parolas la rusan lingvon, lingvo de la "okupantoj", kiuj ili ne plu uzis post la foriro de la lernejo. Ni longe dialogis, pri tio inter samideanoj partoprenantoj en tiu renkonto.

Jen kelkaj proponoj:

1) ke ĉiu samideano kiu iom interesigas pri ekologio, skribu, en ESPERANTO, al la organizantoj de tiu kongreso pri Eŭropaj Verduloj por peti ĉu la esperanta lingvo estos elektita aŭ ne, anoncante ke tiu elekto influos ilian decidon, por partopreni en tiu kongreso.

2) ke, en ĉiu esperantista asocio speciala subskripcio estu lanĉita, ankaŭ konkursoj organizitaj, por helpi, en ĉiu lando la 2 aŭ 3 gajnantojn, per stipendioj, por partopreni en tiu kongreso. (kompreneble, ĉefe en la orientlandoj.) Kiu pretas helpi pri tio?

3) en ĉiu esperantista kongreso, ĉiuj ekologistoj (el iu ajn deveno) dialogu pri tio. Ni do rendezvas al vi ĉiuj en BONDY (SAT-AMIKARO), en BLOIS (U.F.E.), en LINZ (SAT), en KUBO (UEA) k.t.p... en TOURS (MONDCIVITANOJ)... Tiu bulteno estas nur "PROVA". Bonvolu skribi al ni viajn reagojn. Dankojn.

Ni planas publikigi 5 aŭ 6 bultenojn ĉiujare - kiu pretas aboni al ĝi, je la prezo de 30 FF (minimume) por almenaŭ 6 paĝoj?

Kompreneble, ĉiuj proponoj pri kunlaboro estas bonvenaj - Kore

CCP : Emile MAS - SUNRADIO - BORDEAUX CCP n° 409339C - Emile Mas.